

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto
Claude Gacond, 256-a radioprelego, 1968.09.04 & 07

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni deziras hodiaŭ atentigi niajn geaŭdantojn pri gravega evento en la esperanta mondo, kaj per tio helpi al ĝia sukceso.

A.- *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* aperos, se SAT ricevos sufiĉe da antaŭmendoj. En *Sennaciulo*, la organo de SAT, ni povis legi :

Cl.- « *La generacio de 1931 fervore subtenis la eldonon de la Plena Vortaro de Esperanto ! Ĉu la generacio de 1968 kuraĝos same helpi al la eldono de Plena Ilustrita Vortaro ? Urgas respondi al tiu Alvoko. »*

A.- Jam delonge estas parolate pri la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. En ĉiu jar-raporto, dum ĉiu Kongreso de SAT oni skizis la sinsekvajn fazojn de la preparo de la volumo.

Cl.- En *Heroldo* de novembro 1967 sinjoro Neergaard donis precizojn pri la plano. Tiam la cifero de la probabla vendo-prezo estis relative alta, eĉ tro alta : tiu prezo de 24 dolaroj kongruis kun la oferto de la unua presejo konsultita.

A.- De tiam SAT turnis sin al aliaj firmoj en pluraj landoj. Tiu enketo estis malrapida kaj dorneca, unue ĉar neniu el la presistoj konas esperanton – due ĉar SAT postulis provaĵon de kompostaĵo el du folioj de la manuskripto.

Cl.- En tiu okazo SAT konstatis, ke ĉiuj presistoj asimilas esperanton al la fremdaj lingvoj, kaj tial do altigas siajn kondiĉojn je 12 aŭ 15 %, - kio havas gravan konsekvencon sur la produktokoston kaj evidente ankaŭ sur la vendoprezon !

A.- Post teda korespondado daŭrinta dek ok monatojn, post elimino de pluraj kandidatoj, kiuj estis tro kostaj aŭ ne kapablis pruvi konkrete sian kompetenton profesian – post atenta komparo inter la ofertoj, la prefero de SAT fine fiksiĝis sur firmo, kies seriozeco kaj tekniko respondas al ĝiaj postuloj minimumaj.

Cl.- Laŭ tiu ĉi oferto SAT povus vendi la *Plenan Ilustritan Vortaron* ne plu 24, sed maksimume 19 dolarojn.

A.- Ja dank'al ia artifiko en la dispozicio de la kompostaĵo, tamen en litertipo sama kiel en la grandformata *Plena Vortaro*, la tuta teksto de la manuskripto kovrus ne plu 1849 paĝojn, sed nur 1584, - kio signifos konsiderindan ŝparon de papero. La formato restus 14 foje 19,5 cm, en solida bindaĵo el tolo.

Cl.- Koncerne al la ilustrado SAT devos redukti ĝian amplekson, ankaŭ pro ŝparemo. Ĝi kovros ĉirkaŭ 10-12 kompletajn paĝojn.

A.- Eble tiu vendoprezo de 19 dolaroj ŝajnos ankoraŭ ekcesa al multaj personoj ; tamen ĝi estas nur la strikta rezultato de minimuma koeficiento aplikata al la fabrikad-kosto. Ni ja ne forgesu, ke SAT devos cedi normalan rabaton al la ĉefaj revendistoj aŭ libristoj, kies rolo estas ankoraŭ pli necesa en merkato tutmonda ol en merkato nacia.

Cl.- Sendube tiu prezo de la *Plena Ilustrita Vortaro* estos proksimume la duoblo de la prezo de nacilingva vortaro similampleksa kiel *Le Petit Larousse Illustré* aŭ *Brockhaus* kaj similaj, kiuj ĉiujare vendiĝas 300-400-oble pli ol la SAT-vortaro vendiĝos. Tia komparado estus tute ne ekvilibra.

A.- Nu, antaŭ 37 jaroj SAT neniel hezitis por eldoni la *Plenan Vortaron* de 512 paĝoj, ĉar tiam la sukceso estis absolute certa. Ankaŭ certe la nuntempaj esperantistoj same avidos

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto
Claude Gacond, 256-a radioprelego, 1968.09.04 & 07

posedi la multoble pli riĉan *Plenan Ilustritan Vortaron*, sed la esperanto-movado de 1968 estas alia ol en 1931.

Cl.- Fakte la nuna esperantista popolo konsistas el du kolektivoj, hermete izolitaj, sen ebleco de reciproka ekonomia kaj valuta interŝanĝo. Ĝuste tiu stato, ja bedaŭrinda, generas la plej grandan parton de la financaj riskoj de la entrepreno.

A.- SAT opinias do prudente ekfronti tiujn riskojn nur kiam ĝi estos akirinta la pruvon, ke almenaŭ 2000 esperantistoj estas pretaj mendi la *Plenan Ilustritan Vortaron* kontraŭ efektiva pago de 19 dolaroj aŭ 254 steloj.

Cl.- Cetere, se la rezultato de tiu sondado estas esperiga, SAT povos presadi pli grandan kvanton, kio reduktos la poekzempleran produktokoston kaj sekve la vendoprezon.

A.- Ni vokas vin, karaj geaŭdantoj, pruvi per via mendo, ke en la mondo almenaŭ ekzistas 2000 esperantistoj. Prenu poŝtkarton kaj skribu sur ĝi jenan deklaron :

Cl.- « *Responde al la Alvoko de SAT mi firme kaj formale promesas aĉeti la Plenan Ilustritan Vortaron, kaj pagi kiam nova komuniko aperos en la esperanta gazetaro.* »

A.- Nepre metu viajn nomon kaj adreson, la daton kaj ne forgesu subskribi.

Cl.- Sendu tiun poŝtkarton al SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris-20, tio kiel eble plej rapide.

A.- Ĝis plia alvoko vi prokrastu ĉian sendon de mono. Laŭ la rezultato registrita SAT decidis pri la sorto de la manuskripto de la *Plena Ilustrita Vortaro* kaj eventuale respondos al ĉiuj promesintoj.

Cl.- Laŭ la lastaj novaĵoj anoncigitaj en *Sennaciulo* de la monato julio ni povas ankoraŭ aldoni kelkajn informojn :

A.- La eventoj, kiuj perturbis la socian vivon en Francio dum tri semajnoj, nefaciligis la laboron ĉe la Centro de SAT ; sen poŝta servo, sen fervojo, sen cirkul-rimedoj en la urbo, eĉ praktike sen telefono ekster Parizo !

Cl.- Kaj kiam finiĝis la ĝenerala striko, ekfalas plumbe sur la tablon de la oficejo de SAT lavango da korespondaĵoj kaose miksitaj. Tamen nun la oficistoj de SAT vidas iom pli klare kaj ili povas diri, ke ĝis julio ili registris, malgraŭ la cirkonstancoj malfacilaj, ĉirkaŭ 600 promesojn de antaŭpago. Ili substrekas, ke tiu kvanto estas la konsekvenco de la nuraj alvokoj en *Sennaciulo* kaj en la bultenoj de la SAT-sekcioj.

A.- Nun ili ankoraŭ ne konas la promesojn ricevitajn ĉe *Heroldo de Esperanto*, ĉe *Esperanto* de UEA kaj ĉe aliaj revuoj.

Cl.- En tiu numero de *Sennaciulo* ni vidas sur foto profesoron Waringhien, la aŭtoro de tiu vortaro, kun sinjoro Caubel, kiu tajpis la 3285 foliojn, kiuj transdonas la manuskripton de la *Plena Ilustrita Vortaro* al sinjoro Bannier, oficisto de SAT. Ĉeestas sinjoro Bartelmes kaj sur la tablo botelo de ĉampana vino, kiu atestas, ke la kvaropo pretas solene stampi tiun historian momenton de la esperanto-movado.

A.- Al vi, geaŭdantoj, restas la vorto. Se vi atendas, ke aliaj aĉetu la vortaron, eble pro manko de mendantoj tiu historia momento nur signifos, ke SAT iluziiĝis pri la aĉetpovo de la esperantistaro. Tion tutcerte vi ne volas.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-